N-ro 08 - Julio 1990

# Ligilo

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 11-1105
CEP 70084 Brasilia (DF) Tel: 226-1298


Jen estas, karaj legantoj, plia eldono de la bulteno "LIGILO", kiu denove provas fariĝi regula eldonaĵo de Brazila Esperanto-Ligo kun la celo liveri al la ĝenerala publiko freŝajn kaj la plej gravajn novaĵojn okazantajn en la Esperantujo. Ĝi estu krome, oportuno instigi homojn al fruktodona diskutado de niaj ĉiutagaj temoj, kaj al amika kunlaboro por la evoluo de la brazila Esperanto-movado.

Sed ĉi-foje, ni devas klarigi ke tiel rapida eldono de plia numero de "LIGILO" estas rekta kaj tuja rezulto de unu el tiuj specifaj artikoloj de LIGILO N-ro 07, nome: "Olhando Para o Futuro". Estas reago veninta de unu el la pioniroj de la Esp-movado en la Federacia Distrikto, kiu nomiĝas JOSÉ ROMÃO FILHO. Samideano ROMÃO decidis kovri la kostojn de kompleta eldono de la bulteno "LIGILO"! Sed tio ja estas nur parto de la unua pozitiva reago al la supre menciita artikolo, kiel vi povos konstati aliloke en tiu-ĉi LIGILO N-ro 8.

Antaŭ ol ĉio kaj nome de BEL-Estraro, la plej sincerajn dankesprimojn al samideano JOSÉ ROMÃO FILHO pro la malavara donaco kaj tre valora kontribuo.

## A PRIMEIRA REAÇÃO

A primeira reação positiva ao artigo "Olhando Para o Futuro", publicado no LIGILO N-ro 7 não se fez esperar. Partiu do associado JOSE ROMÃO FILHO, fundador e proprietário do empreendimento imobiliário "Cidade Comendador Romão", localizada a aproximadamente 100km do Centro de Brasília.



JOSÉ ROMÃO FILHO - Comendador

Mi amas ESPERANTO-n

# Seu histórico

JOSÉ ROMÃO FILHO, Comendador do Rotary Internacional, graduado nesta posição de Comendador, por merecimento, cujo agraciamento da Instituição Rotariana, reconheceu as suas qualidades de um brasileiro autêntico, virtuoso e capaz de realizar e de transformar os seus "Sonhos em Realidade", prova é que, deixou sua terra natal, vindo para as caatingas goianas desbravar aquelas matas verdejantes e, colaborar em implantar no solo pátrio, o exemplo de seu trabalho profícuo e ardoroso a causa nobre e dignificante, das **estradas**, da **energia elétrica**, do **transporte**, do **povoamento** em regiões nunca d'antes habitadas como está sendo agora...
Esse "Entorno" de Brasília, vem de maneira admirável comprovar a sua capacidade de realização e que inegavelmente podemos confirmar, através de nossas visitas "in loco" aquelas regiões, cujo convite fica feito através deste Documentário intitulado "DO SONHO À REALIDADE", para que os brasilienses e mesmo pessoas de outros rincões venham conhecer e comprovar o que vem a ser a "CIDADE COMENDADOR ROMÃO", testemunho autêntico de um homem lutador e beneficente que fez diversas "doações" de suas terras às Instituições sociais e religiosas, vindo destarte, a trazer e a proporcionar o desenvolvimento desta feliz e próspera região que hoje, merecidamente dá-se o nome de "CIDADE COMENDADOR ROMÃO"...

Logo que tomou conhecimento do nosso apelo, samideano JOSE ROMÃO FILHO decidiu fazer à Liga Brasileira de Esperanto a doação de um lote de terreno com área de 200m² naquele empreendimento imobiliário denominado "Cidade Comendador Romão".

Para celebrar a assinatura dos documentos cartoriais, um grupo de cerca de 25 esperantistas de Brasília, Anápolis, Goiânia, Ubá e Natal visitou o local no dia 27 de maio, deixando ali assinalado o local pela fixação de uma placa com a identificação da Liga.

O valor do lote doado pelo samideano ROMÃO está estimado em Cr$ 70.000,00 aproximadamente.

A reação de pronto do Comendador Romão nos incentiva a continuar a Campanha de Formação do Patrimônio da BEL, iniciada com a publicação do citado artigo no LIGILO n-ro 7.

O prezado leitor está também convidado a participar, quer seja como eventual doador, ou como divulgador da idéia entre seus conhecidos.

---

## A D E S Ã O 1 9 9 0 !

### VOCÊ JÁ RENOVOU A SUA?

A Liga está apresentando a seus associados o terceiro número do Ligilo em 1990, o que mostra que pouco a pouco vamos atingindo a normalidade na publicação deste boletim.

Conclamamos os dois terços dos associados que ainda não quitaram sua adesão em 1990 a regularizarem sua situação junto à Liga para que possamos dar continuidade tanto nas edições de informativos como a outros serviços.

Devido aos altos custos de publicação do Ligilo e sua expedição, a Liga se vê impossibilitada de enviar os próximos números àqueles que não quitarem sua adesão.

## BOLETIM DE ADESÃO **1990**

Nome ______________________________

Endereço ______________________________

CEP __________ Cidade __________ Estado __________

Telefone ( ) __________ Data de nascimento: ______ de __________ de 19____

Profissão ( ou especialidade ) __________ Data de adesão: ___ / ___ / ___

Assinatura: ______________________________

**1. LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

| ADESÃO | BTN | NCz$ |
|---|---|---|
| Sócio Contribuinte | 24,00 | |
| Familiar de Sócio | 12,00 | |
| Estudante (até 25 anos) | 12,00 | |
| Sócio Colaborador ... a partir de | 40,00 | |
| Sócio Vitalício (30 vezes a cota do Sócio Contribuinte) | 720,00 | |
| Donativo | - | |

**2. ASSOCIAÇÃO MUNDIAL DE ESPERANTO (UEA)**

| ADESÃO | BTN | NCz$ |
|---|---|---|
| MG - Membro Individual, recebendo apenas o MANUAL sobre o movimento esperantista | 5,00 | |
| MJ - Membro Individual, recebendo o ANUÁRIO (e a revista KONTAKTO se menor de 30 anos) | 12,00 | |
| MA - Membro Individual, recebendo o ANUÁRIO e a revista ESPERANTO (e a revista KONTAKTO, se menor de 30 anos) | 30,00 | |
| DM - Membro Vitalício, com os mesmos direitos de MA (e a revista KONTAKTO, se menor de 30 anos) | 720,00 | |
| SZ - Sociedade Zamenhof: Mecenato (não inclui adesão à UEA) | 58,00 | |
| **SÓ ASSINATURA DE REVISTA** | | |
| Revista ESPERANTO | 20,00 | |
| Revista KONTAKTO | 10,00 | |
| SUBTOTAL | | |
| DESPESAS DE REMESSA PARA O EXTERIOR ( Associado da LIGA, quite 1989, está ISENTO ) | + 10% | |
| TÓTAL | | |

ATENÇÃO: - Os valores estão fixados em BTN (Bônus do Tesouro Nacional).
- O cálculo em CRUZADOS NOVOS deve ser feito multiplicando-se pelo valor do BTN no 1º dia do mês.




## TUDO PRONTO EM SALVADOR

Com a distribuição do DUA BULTENO, a Comissão Organizadora do 26º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO vence uma das últimas etapas para receber o grande número de esperantistas que por certo afluirão à bela e hospitaleira Salvador.

Alguns detalhes importantes, contudo, gostaríamos de acrescentar para melhor orientação dos nossos congressistas:

1) ABERTURA:
<u>Data/hora</u> - 06 de julho de 1990 - 20:00 horas;
<u>Local</u> - Teatro de Nazaré
Pç. Conselheiro Almeida Couto
Bairro de Nazaré



2) KONGRESEJO KAJ LOGEJO:
Colégio Estadual da Bahia
(antigo Colégio Central)
Av. Joana Angélica



<u>Recepção</u> - a partir do dia 5.


<u>Loĝejo</u> - a partir do dia 5 à tarde.

<u>Loĝejo-kotizo</u> - Cr$ 300,00.

<u>IMPRESCINDIVEL</u> - LEVAR ROUPA DE CAMA.

3) BAILE:
<u>Data</u> - 09/07/90
<u>Local</u> - Casa D'Itália

4) LIBROSERVO: Como já é tradicional, a BEL transportará também este ano o seu LIBROSERVO para o Congresso.



Mi amas Esperanto-n

## POLA DIPLOMATO ĈEESTOS LA KONGRESON

Estas konformite: la Unua Sekretario de Pola Ambasado partoprenos en la 26-a Brazila Kongreso de Esperanto okazonta en Salvador. La invito estas farita al la pola Ambasadoro, kiu multe bedaŭris la neeblecon persone ĉeesti la eventon kaj tial estos reprezentata de la Unua Sekretario.

## LA FONDINTOJ MISNOMITAJ !

Unu el niaj karaj legantoj sendis al ni rimarkojn kun alĝustigoj rilate al historiaj notoj publikigitaj en "Brazila Esperantisto" Jan/Feb'89. Nun, kiam eblas al ni publikigi la korektojn, tre bedaŭrinde, ni ne plu trovas la koverton kaj domaĝe nia kunlaboranto ne skribis en la dokumento sian nomon. Ni pardonpetas kaj estos dankemaj al vi laŭeble denove kontakti nin. Jen la observoj faritaj:

--Laŭ "Brazila Esperantisto", Januaro 1957, la Unua Numero de la eldonaĵo de BEL aperis en aprilo 1907 kaj, tiam, ĝia titolo estis "Brazila Revuo Esperantista".

--En septembro de 1908 oni ŝanĝis la nomon de la publikaĵo al "BRAZILA ESPERANTISTO".

--En "Brazila Esperantisto", Jan/Feb 1989, oni misskribis la nomojn de la fondintoj kaj unuaj redaktoroj:

Do, ALBERTO ne estas <u>ALVES S</u>. VIEIRA,
sed ALBERTO <u>ALVARES F</u>. VIEIRA.

REYNALDO, ne estas <u>S. GAYZER,</u>
sed REYNALDO <u>F. GAYER;</u>

kaj EVERARDO BACKHEUSER estas korekte kvankam lia tuta nomo estis:
EVERARDO ADOLPHO BACKHEUSER.

Mi amas ESPERANTO-n



Saiu o mais novo lançamento
de FLÁVIO FONSECA !
É o cassete AERLUMO ,
genial versão em Esperanto
do LP "Luz do Ar",
recente sucesso de Flávio.
Contém dez músicas de
alto nível, com participação de
Antonio Adolfo, Nando Carneiro
e muito mais!
E ainda um encarte com comentários
do autor e todas as letras para você acompanhar!
PEÇA JÁ O SEU!
Edição e distribuição exclusiva: BEL.
Preço de lançamento: Cr$ 800,00. Desconto para revendedores.

## MALDEKSTRE SUBE MAJUSKLE, PREFERINDE

Plurfoje alvenas ĉiaspecaj leteroj kiuj kontraŭ nia volo, bedaŭrinde restas sen respondo aŭ publikigo de la koncerna peto ĉar oni ne skribis sian adreson en angulo de la letero aŭ bildkarto.

La problemo okazas kiam survoje la koverto estas ĉifita, disŝirita aŭ inkmakulita. Ĉemane estas korespondpeto de F-ino Rumjana, 28-jaraĝa instruistino kiu deziras korespondi kun brazilaj geesperantistoj pri libroj kaj vojaĝoj, kies leterkoverto alveninta permesas nur identigi "Sofio 1510, Bulgario". En la poŝtkarto sendita ŝi, domaĝe, ne skribis sian adreson.

Tre gravas ankaŭ ke vi skribu majuskle kaj preslitere ĉar kelkfoje, depende de la manskribado estas tre malfacile distingi literojn.

Do, ni rekomendas vin ne forgesu indiki MAJUSKLE kaj PRESLITERE vian kompletan adreson, ne nur sur la koverto, sed preferinde en la maldekstre suba angulo de via letero. Ni antaŭdankas !

# L A E K S T E R A I D E O

La movado foje batalas, ĉu ĝi koncentru siajn fortojn kadre de la Zamenhofa interna ideo, ĉu ĝi enpaku ĉiajn strebojn ekstere de idealaj aspektoj. Iuj prioritatas al nura rekta parola informado ĉe najbaroj kaj konatoj; aliaj preferas envivi sian verdan komunumon kalkulante je ĝia natura allogeco. Ekzistas samideanoj, kiuj nur pensas al agnoskiĝo fare de politikaj aŭ sociaj instancoj; ceteraj sin dediĉas al varbokampanjoj laŭ amatoraj kriterioj, kaj sen buĝetaj implicoj. Tiuj kvar vojoj estas lasitaj al la plaĉo de lokaj grupoj, kiuj ne emas al programita politiko. Ankaŭ estas la multaj izolitoj ne enplektitaj en iun ajn propagandon.

Freŝdata esplorado ĉe la landaj asocioj montris, ke la tuta konata movado kreas ĉiujare malpli ol 30.000 eklernantojn, el kiuj eĉ ne 3.000 ĝisvivas la unuan jaron ĉe ni, kio ofte nur kompensas konstantajn perdojn pro seninteresiĝo, laciĝo aŭ morto. Oszkar Princz ĵus montris en tre preciza enketo, ke lokaj statistikoj reliefigas la saman konkludon: ĉu per tiuj rezultoj Esperanto ĝisvivos duan plenan jarcenton?

Mi mem, daŭre, sed pli detale en la lastaj monatoj, trakribris la diversajn organojn de niaj L.A., kiuj, logike, estas la bildoj de la organizita movado. Leviĝas ses respondotaj demandoj:

1) ne abundas nacilingvaj bultenoj por la amaskomunikiloj;
2) ne aperas la prezentado de lokaj varboprojektoj;
3) sekve ne vidiĝas iliaj pozitivaj aŭ negativaj rezultoj, kiuj havas intereson por alilokaj gekolegoj;
4) ne svarmas la servoj proponeblaj al novbakitoj;
5) ekaperas, iom dise, sed sen granda konvinko, la propedeŭtika argumento, ke Esperanto faciligas studadon de aliaj lingvoj;
6) preskaŭ nenie estas aludita la ebleco al planita (eventuale pagota) reklamo, kiu povus esti

(daŭrigo paĝ. 11)

## LASTE APERIS... SUR NIA BRETARO

| | | |
|---|---|---|
| -Apologio de Sokrato | gld | 14,19 |
| -Babiladu Esperante | " | 4,62 |
| -Bonkora Ŝjaudon | " | 5,28 |
| -La Bermuda Triangulo | " | 52,80 |
| -Bibliografio de Universitataj kaj Altlernejaj Diplomverkoj, Disertacioj kaj Tezoj pri Esperanto kaj Interlinvstiko | " | 29,70 |
| -Bovisto kaj la Teksistino | " | 3,96 |
| -Ĉu Ŝi Mortu Tra-Fike? | " | 16,50 |
| -Ekologio, Ĉu Ideologio? | " | 1,65 |
| -El la Klasika Periodo de Esperanto: Grabowski kaj Kabe | " | 7,92 |
| -Enlumiĝo | " | 12,21 |
| -Esperanta Versfarado kaj Rimaro | " | 9,50 |
| -Esperanto en Nova Framo | " | 2,97 |
| -Esperanto - Lingvo de Naturscienco kaj Tekniko | " | 3,30 |
| -Fondita sur Roko | " | 11,22 |
| **-Fontoj de Esperanto, La** | " | 9,24 |
| **-Fundamenta Vortaro Naŭlingva** | " | 103,62 |
| **-Generaciaj Aspektoj de la Esp-Movado** | " | 3,30 |
| **-Historio de la Lingvo Esp.-1887/1912** | " | 19,80 |
| -Historio de TEJO | " | 3,30 |
| -Imperio de l'Koroj | " | 33,00 |
| -Inferio | " | |
| -Insulo de Voĉoj, La | " | 16,17 |
| -Jura Terminaro | " | 4,29 |
| -Juraj Terminologiaj Problemoj | " | 9,90 |
| -Kantareto - Ĉeĥoslovakaj Popolaj Kantoj Esperantigitaj | " | 7,00 |
| -Kaverno Apud la Maro | " | 29,70 |
| -Kion Travivis Aŭstra Familio en Brazila Praarbaro | " | 29,70 |
| -Kiu Estas Patro Pio? | " | 1,98 |
| -Konsolo de la Filozofio | " | 19,14 |
| -Kresko de Esperanto-Vortoprovizo | " | 5,28 |
| -Kritikaj Studoj Defende de Esperanto | " | 25,08 |
| -Kuriozaj Floroj kaj Arboj | " | 49,50 |
| -Kvaropo (kun aŭtografoj de la aŭtoroj) | " | 52,80 |
| -Litomiŝla Tombejo | " | 52,80 |

-Lumo de Azio, La........................ " 4,29
-Matematika Terminaro Esp-Angla-Franca
-Sveda..................................." 9,90
-Memorlibro Pri la Internacia Jubilea
Konferenco: Cent Jaroj de Esp-Kulturo.. " 55,77
-Merlo sur Menhiro......................." 16,50
-Mia Spektro............................." 14,85
-Mia Vivo................................" 3,96
-Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj Lingvaj
Aspektoj de la Moderna Komunikado....... " 3,30
-Natura Nutrado el Buiologiaj, Etikaj
kaj Estetikaj Vidpunktoj................." 3,30
-Noveloj (André Maurois)................." 10,89
-Papilia Fonto..........................." 3,30
-Plena Esperanto-Persa Vortaro..........." 99,00
-Por Ekologia Socio......................" 6,60
-Projekto de Senriproca Monda Monsistemo " 7,92
-Projekto de Tuja Forigo kaj Evito
de Inflacio.............................." 8,91
-Proververo Franca-Esperanta kun Esprimoj
Sankciitaj de l'Uzado...................." 6,60
-Psikologiaj Reagoj al Esperanto........." 3,30
-Sferoj 6: Sciencfikicio kaj Fantasto... " 19,80
-Soci-Politika, Pedagogia kaj Kultura
Valoroj de Esperanto, La................." 3,30
-Verkoj de Verda Majo...................." 21,78
-Zamenhofa Teksto de la Malnova
Testamento (Ĵosuo)......................." 3,30
-Zamenhofa Teksto de la Malnova
Testamento (Jugistoj)...................." 3,30

## KLUBAJ AKTIVECOJ

Inter la multnombraj kluboj, studgrupoj kaj societoj kiuj aktivas en nia landa movado, estas rimarkindaj la viglaj aktivecoj lastatempe de "Esperanta Stud-Grupo ZAMANHOF", Salvador, BA.; de Niterói Esperanto-Klubo, RJ.; kaj Anápolis Esperanto-Klubo, GO., kiuj konstante raportas pri siaj agadoj.

Gratulon kaj sukceson al la gvidantoj !

translima; eble kialas ĉi-tie la praa timo nomi Esperanton varo.

Jen, samorde, proponeblaj sugestoj:

1) Asociaj esperantlingvaj bultenoj nepras por fideligi la anaron kaj helpi la komencantojn resti en la asocia kadro; sed mi kuraĝas aserti, ke la duonon de la strečoj oni ŝparo (se oni ne havas pliajn rimedojn) por monataj unupaĝaj cirkuleroj, aŭ trimestraj bultenetoj en la loka lingvo por senlace bombardi la grandajn informkanalojn. La informservo de U.E.A. ĵus anoncis ke ĝi pretas helpi tiudirekte. Insistu al ĝi ke ĝi resendu al vi la materialon, kiun ĝi povas kompili el ĉiuj fontoj.

2) **Malmultaj revuoj raportas** la protokolojn de **naciaj estrarkunvenoj**, kiuj montrus, ke, krom **administri**, la gvidantoj ankaŭ komune pripensas, lanĉas, atentas varbokampanjojn. Certe resumoj almenaŭ instigos al partopreno.

3) La manko de raportoj gravas, ĉar ĝi malebligas konstati kaj sukcesojn kaj la fiaskojn. Estas ampleksa interŝanĝo de landaj organoj. Ili diskonigu spertojn, kiujn, en aliaj asocioj, oni povos kopii aŭ adapti, depende ĉu la sekvoj estis valoraj aŭ ne. Abundas en REVUO ESPERANTO, kaj ĉefe en HEROLDO DE ESPERANTO aranĝoj, solenoj, prelegoj, kunvenoj... kiuj ĉiam pretekstas al prezento de la internacia lingvo. Sed malofte oni legas pri la preparoj, kaj la efektivaj rezultoj. Neniam statistikoj! Komparoj al aliies spertoj povus ankaŭ instigi al laborĝemeliĝoj inter samnivelaj asocioj, aŭ al patronhelpo de pli sukcesa al malpli forta.

4) HEROLDO DE ESPERANTO, kaj aliaj, ankaŭ citas amason da faktoj kie oni rapide praktiku la lingvon; dezirindus, ke ĉiu asocio havu rapidan sistemon por prezenti tiujn servojn nacilingve ĉar ili estas la argumentoj kiujn ni elmontru, kaj kiujn novbakitoj insiste volos profiti. Niaj

elstaraj kolegoj, kiuj oftege, disertas, inter si, tra la tuta revuaro, havus okazon tie disponigi sian konvinkokapablon por helpi la redaktorojn!

5) Aktivaj aŭ emeritaj instruantoj ege proporcias en nia anaro. Ili havas la moralan devon prepari la materialon, kompili la pruvojn, eĉ estigi la eksperimentojn por ke ĉiuj uzu la argumenton pri la perada rolo de Esperanto por lerni aliajn lingvojn. Ofte tiaj homoj ne emas al varbado, jen do alia egalvalora hobio! Tiu tasko estas tiom eminenta, kiom la multaj seminarioj, staĝoj, vortardebatoj en kiuj ili plezuras! Ni pensu, ke se unu terloĝanto el 100, kiun oni trudas al la angla lingvo estus proponita trejniĝi per esperantolernado, ni jam milobligus nian merkaton da eklernantoj, sekve, da finlernantoj.

6) Post cento da jaroj, ĉu estas aŭdace prezenti Esperanton per pagota reklamo; la Landaj Asocioj ne sufiĉe riĉas, sed kial ne ambicii ion tra ilia "tuto", nome U.E.A., ĉe translimaj komunikiloj... eble kun ia plurlanda mecenato? Komence tio favoros iun mondoparton, kiun fakuloj selektos post merkata esploro. La koncernataj landaj asocioj sin draste preparos zorge respondi al petoj, kaj proponos adaptitajn lernilojn, kaj perfektajn servojn. Ili instigos la novulojn aliĝi al U.E.A., nura vojo repagi al tiu-ĉi la investon por rekomenci aliloke. Nia varo indas je moderneco!

Najbaraj landoj kiel Japanujo kaj Ĉinujo, Belgujo kaj Britio, Brazilo kaj Kolombio ege malsimilas je homrimedoj; sed ni scias, ke, delonge, internaciaj firmaoj, sen komuna lingvo, kapablis eltrovi adaptitajn vendosistemojn. Nia minuso estas la financ-kapablo, sed ni havas tri plusojn: konsiderinda fervoro, senlima merkato kaj komuna lingvo!!

Eble vi atendas la promociajn strebojn de U.E.A. mem; ĝeneralan agadon eble fiksas la UEA-komitato kiu kunvenas unufoje jare! Niaj, viaj, komitatanoj scias, ke tio nur parte veras. Estraraj komisiitoj provas ordigi punktajn aferojn, sed mankas granda projekto (*) La vera krio de la ĉijare adoptita "strategia plano" estas: <u>ni eduku al tutmonda konscio</u>. Se sufiĉe multaj aprobas, el tiuj ĉi-supraj sugestoj povas naskiĝi unu el la plej gravaj subplanoj. Ni devas vendi al la ekstera mondo tiun nian koncepton ke plifacila komunikado estas unu el la homaj rajtoj.

Ĉu vi konsentas?

Jean-Louis Texier
27, chemin des Carreaux
F 91590 Cerny, FRANCIO

(*) Granda projekto havas precizajn karakterojn: difinitan trafcelon, kalendaron, kontrolrendevuojn, kaj komisiitajn gvidantojn.

Mi amas ESPERANTO-n

<u>HELPOKRIO EL ANGLUJO - MUZIKISTOJ ALVOKATAJ</u>

Laŭ peto de samideanino Angela Bariani el Santa Albertina, São Paulo, ni publikigas ĉi-suban tekston veninta el Anglujo kiu petas kunlaboron cele al la preparo de MuzikTerminaro. Jen la teksto:

"MI PETAS LA PROPONON DE INKLUZIVNOTAJ TERMINOJ EN LA FORMO DE CITAĴOJ KIUJ NEPRE MONTRU LA UZ-MANIERON ,AŬ PER DIFINO EN ESPERANTO (NE EN NACIA LINGVO), AŬ PER UZO EN FRAZO. MUZIKAJ CITAĴOJ ANKAŬ BONVENAS. PROPONOJN ONI SENDU AL: ANDREO MARSHALL, 42 HIGH ST., WALTHAM, GRIMSBY, S. HUMB, DN37 OPL, ANGLUJO."

## CU VI DEZIRAS KORESPONDI ?

Se vi deziras korespondi kaj samtempe plibonigi viajn lingvajn konojn, amikiĝi kaj intersanĝi spertojn, jen kelkaj korespondpetoj, kiujn ni kun plezuro prezentas al vi:

--DAGMAR VOPATOVA, 17-jara fraŭlino, interesiĝas pri kulturo, klasika kaj ĵaza dancoj, historio, kuirarto kaj folkloro. Ŝi amas hundojn, florojn kaj kolektas bildkartojn.
Adreso: Bezrucova 1498, Hradec Krålovėz, 500 02 ČEKOSLOVAIO.

--VESELA PAVLOVA, 25-jara fraŭlino, nova esperantistino, deziras korespondi kun brazilan(in)oj pri muziko, literaturo kaj kino.
Adreso: $14^{an}$ Gogolstr., Sofio 1127, BULGARIO.

--ALINA GTOWIAK, lernantino de la sepa klaso, serĉas brazilan esperantiston kiu deziras korespondi.
Adreso: Sobôtka 130, 63 450 Sobôtka, woj. kaliskie, POLLANDO.

--LADA PATLOKA, 25-jara edziĝinta kristano, informas ke plezurigus lin korespondamikeco prefere kun samaĝul(in)oj. Tamen, la aĝo ne tre gravas.
Adreso: Nådrazni 35, Ivanovice, CS 683 23 ČEKOSLOVAKIO.

--CATHERINE POLY, 28 jaraĝa francino, kiu lernas Esperanton de 5 monatoj, laŭeble deziras korespondi kun loĝantoj en Amazonio.
Adreso: 2 rue Vlaminck, 91350 Grigny, FRANCIO.

--SÉRGIO CARDOSO MORALES, 20-jara fraŭlo, komencanto, interesiĝas pri lingvoj, astronomio, ufologio, homaj rajtoj, ekologio kaj aliaj temoj.
Adreso: Rua Alvaro Alencastro 63, BR-97570 Santana do Livramento, BRAZILO.

# CIDADE COMENDADOR ROMÃO


EMPREENDIMENTOS IMOBILIÁRIOS LTDA.

## *José Romão Filho*

• LOTES INDUSTRIAIS • LOTES COMERCIAIS
• LOTES RESIDENCIAIS

*VENHA MORAR BEM, FUJA DO ALUGUEL*

MAPA DA CIDADE
COMENDADOR ROMÃO




**351 · 4393**

TELEX: 061-TX.3296 – IDET

C.09 – LT.03 – LJ.01 (FUNDOS) – TAGUATINGA-DF


Lote da Liga

Remetente: LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
Caixa Postal 11-1105
CEP 70084 - Brasília - DF

MI amas ESPERANTO-n

IMPRESSO